★

# Invitilo al programo de Esperantista klubo Brno

Karaj gesamideanoj,

Ni kore invitas vin al sekva programo de Esperantista klubo Brno

Temo

## Kion ni legas

Oni diras, ke esperantistoj malmulte legas. Per tiu ĉi diskuto, kiu ripetiĝas dufoje jare, ni volas montri al homoj, ke ekzistas legindaj libroj en Esperanto. Kaj originale verkitaj en Esperanto aŭ tradukoj el naciaj lingvoj. Venu kaj diru al ni, kion vi legis en Esperanto lastfoje. Montru, ke nia literaturo estas iom riĉa kaj indas ĝin legi.

**Gvidos:** **Milan Kolka**

**Lingvo:** Esperanto

**Kiam:** la 7-an de majo 2025 je 18.00 (UTC+2)

**Kie:** **La renkontiĝo okazos rete per Jitsi**

Jen la ligilo:
https://meet.jit.si/moderated/43f7d1610134c4b80b45e5560715ace9e1916f8261e962d99dea0449e8962abd

Ni rekomendas, ke vi uzu aŭskultilojn kun mikrofono por preventi eĥon. Sed ne estas bezonata, vi povas uzi mikrofonon en via portebla komputilo (notebook).

★

## Ni rekomendas

- La 9an — 11an de majo 2025 Aŭstria Esperanto-Kongreso 2025 (Graz, Aŭstrio)
- La 5an — 13an de julio 2025 59aj Baltiaj Esperanto-Tagoj (Kaunas, Litovio)
- La 19an — la 26an de julio 2025 58-a ILEI-KONGRESO (Beogrado, Serbio)
- Kaj precipe ni rekomendas UK 2025, kiu okazos en Brno.
- **Trapasu KER ekzamenon** en Brno. Ĉiuj eblaj niveloj (de B1 ĝis C2)

★

## Ekskursoj dum UK

Kelkaj ekskursoj dum UK estas jam forvenditaj. Tamen restas ankoraŭ kelkaj, kiuj estas unikaj. Ni elektas du el ili.

**Vilao Tugendhat**

La vilao Tugendhat, konstruita inter 1928 kaj 1930, estas grava verko de moderna arkitekturo, projektita de la fama arkitekto Ludwig Mies van der Rohe. Ĝi situas en Brno kaj estas konata pro siaj novigaj konstruaj teknikoj kaj minimalisma dezajno. Ĝiaj havantoj estis la entreprenisto Fritz Tugendhat kaj lia edzino Grete, kiuj volis krei reprezentan familian domon. La internejo de la vilao konsistas el malfermitaj spacoj kaj grandaj fenestroj, kiuj ebligas maksimuman eniron de natura lumo, kreante harmonian interligon inter la interno kaj ekstero.

En la jaro 2001 la vilao Tugendhat estis enskribita en la liston de mondaj heredaĵoj de UNESKO, kio konfirmas ĝian kulturhistorian valoron. La origina ekipaĵo de la vilao, kiu estis en la Dua Mondmilito difektita, nun estas zorgeme restaŭrita kaj konservita, por ilustri la vivstilon de la familio Tugendhat.

**Normale preskaŭ ne eblas aĉeti biletojn, ili estas forvenditaj multaj monatoj antaŭ.**

**Stelobservejo**

Se vi demandos astronomojn, kia estas nia kosmo, ili priskribos ĝin al vi per mil manieroj. Komencante de la diversaj planedoj de la Sunsistemo, tra sorĉaj kometoj, varmaj steloj kaj eteraj nebulozoj, ĝis galaksioj malproksimaj miliardojn da lumjaroj. Ili almiksos misteran malhelan materion, kelkajn nigrajn truojn, manplenon da malhela energio, kaj finfine spicas ĉion per pinĉo de strangaj elementaj partikloj. Sed por ordinara terano tia listo de terminoj estas kiel foliumi kuirlibron sen povi gustumi la individuajn ingrediencojn kaj la rezulton de la kuirado. Kaj tial ni decidis prezenti al vi nian universon tute alimaniere – vi spertos ĝin per ĉiuj viaj sensoj. Kaj por ke tio ne estu malmulte, ni surmetos specialajn 3D-okulvitrojn, kiuj plifortigos la ĝeneralan sperton. Kie okazas ĉi tiu unika gustumado? En la cifereca salono de la stelobservejo de Brno, en la tute nova spektaklo "Kosmo per Ĉiuj Sensoj 3D" en Esperanto.

Post la programo la fama astrofizikisto kaj esperantisto Amri Wandel komentos por vi sub kupolo someran ĉielon. Vi povos eĉ elflugi el nia galaksio kaj observi ĝin de supre. **Ne maltrafu tiun ĉi unikan vesperan programeron!**

★

# Cetera programo en majo

La 14an **Amuzu, lernu kaj ridu** – Josef Vojáček, klubejo
La 21-an **Irlanda skribo**, komuna renkontiĝo kun klubo el Glivice, rete per Zoom
La 28-an *Ankoraŭ ne agordita*, klubejo

# Programo en junio

La 4-an **Bazo de la ĉeĥa lingvo** – Milan Kolka, komuna renkontiĝo kun klubo el Glivice, rete per Zoom
La 11-an *Ankoraŭ ne agordita*, klubejo
La 18-an *Ankoraŭ ne agordita*, rete per Jitsi.
La 25-an **Komuna rostumado en interdoma bloko Křídlovická-Poříčí**

Mi dankas al Josef, ke li preparis programon por la 14a de majo. Ankoraŭ restas tri ne agorditaj programoj. Du en la klubejo, unu reta. Mi petas vi, ke vi proponu la programon.

★

Pozvánky Vám chodí, protože jste členy klubu nebo příznivci, kteří souhlasili se zasíláním pozvánek. Souhlas můžete kdykoliv odvolat, stačí to napsat v odpovědi na tento e-mail.

Program klubu můžete též zjistit:

- na našich webových stránkách (https://www.esperantobrno.cz/index.php/eo/aprogramo),
- na naší stránce na Facebooku (https://www.facebook.com/esperantobrno/)
- a na aEventa servo (https://eventaservo.org/o/EO_Brno)

Nahrávky proběhlých přednášek a některých dalších programů naleznete na našem kanálu na Youtube (https://www.youtube.com/channel/UCQLClocHDdrb9TaHggRM5cA).

Náš program budeme nadále zveřejňovat na našem webu, Facebooku a na Eventa servu. Zejména Eventa servo považujeme za hlavní zdroj informací o esperantských akcích. Na webu esperanto.cz

budeme zveřejňovat pouze celostátně významné akce (jako je třeba oslava výročí klubu) a on-line schůzky.

Milan Kolka
prezidanto

(Noto: bonvolu ne uzi retpoŝtadreson invitiloj@esperantobrno.cz por respondoj, ĉar ĝi funkcias kiel nigra turo. Se vi sendus ion ajn al ĝi, la mesaĝo atingus nenies retpoŝtkeston.)